

*SEKCIO PRI VORTARO*  
*SUBKOMISIONO PRI TEKNIKA KAJ SCIENCA LINGVO.*

Al S-ro VERAX, Direktoro de la Subkomisiono por la Teknika Vortaro.

Kara sinjoro Direktoro,

Tute pravaj ŝajnas al mi la konsiloj kaj instrukcioj, kiujn vi donas al viaj kunlaborantoj pri la scienca vortfarado. Nedube estas, ke ili aŭskultos ilin, kaj ke tiamaniere oni facile evitos ĉiujn eblajn konfliktojn, inter la komuna lingvo kaj la teknika.

Esperanto kiel ĉiu vivanta lingvo, estas nek pure vulgara, nek pure scienca, sed samtempe ambaŭ.

Tiun ĉi duoblan econ ni ĉiuj devas bone kompreni : la literaturistoj, por ke ili ne riproĉu malprave la scienculojn pri la uzo de esprimoj, vortoj aŭ afiksoj, kiujn postulas la necesa precizeco de ilia lingvo : la sciencistoj, por ke ili ne volu altrudi al la nescienculoj ian tute logikan diron aŭ skribmanieron, kiu forigus la larĝecon, kondiĉon mem de (por ke ĝi estu viva) necese kvazaŭ instinkta lingvo.

La beletristikistoj estu do indulgemaj al la kelkafoje iom kruda stilo de la scienverkistoj, kaj tiuj ĉi ne rigardu kun tro da malŝato la neprecizecon de tiuj, al kiuj sufiĉas lingvo klasika, facila kaj agrabla. Ambaŭ lingvoj estas estimindaj, tial ke ambaŭ, laŭ sia propra maniero, povas esprimi altajn veraĵojn kaj ideojn.

Aliparte, konsolo povas esti al kelkaj tro malpaciencaj sciencistoj tiu certigo, ke iom post iom kaj nesentebly multaj el iliaj esprimoj enpenetros en la komunan lingvon, kiu, laŭ natura evoluado, fariĝas ĉiam pli plena kaj ĝusta.

Permesu, kara sinjoro, ke mi citu tie ĉi, por fini tiun ĉi enkondukan leteron, fragmenton de tute rimarkinda artikolo de S-ro Marcel LAIGNIER : « Ĉu teknika aŭ komuna estas la jura lingvo? <sup>(1)</sup> ». Ĝi plene rilatas nian temon.

» La vortoj de la *teknika* lingvo priskribas la fenomenojn kaj la objektojn, absolute kaj en ili mem konsideritajn, por ke oni povu ilin eksperimente reprodukti aŭ rekonstrui. Male la vortoj de la

---

(1) *La Revuo*, aprilo 1912, p. 378- 381.

*komuna* lingvo... priskribas la fenomenojn, la objektojn, kaj la ideojn, konsideritajn pro iliaj rilatoj kun la ĉiutaga vivo. Alivorte la scienca lingvo estas objektiva (kiel diras la Germanoj) dum la komuna estas subjektiva... Konsekvence la *scienca* lingvo celas signi la objektojn per esprimo de ĝiaj ĉefaj ecoj... Male la komuna... nur per tiu eco, per kiu ĝi rilatas la subjekton. Alivorte ankoraŭ, se mi volas uzi la terminojn, kiujn difinis S-ro de Saussure, mi diros, ke la *scienca* lingvo tendencas obei la leĝon de *neceseco*, dum la *komuna* pli bone obeas la leĝon de *sufiĉeco*. »

Kaj nun, kara kunlaboranto, mi deziras al viaj laboroj plej grandan sukceson, por la bono de nia komuna afero.

Th. CART,

*Ĝenerala Direktoro  
por la komuna kaj Teknika Vortaro.*

*Alvoko al la specialistoj, teknikistoj kaj scienculoj.*

Kiam la Esperantista Akademio decidis la novan organizon, pri la vortaraj laboroj, ĝi montris sian deziron, ke tiuj laboroj estu en plej granda interkonsento kaj unueco.

Mi akceptis la proponon, kiun ĝi faris al mi, direkti la sekcion pri la Teknika kaj Scienca Vortaro, ĉar mia intenco estas dediĉi ĉiujn miajn klopodojn por helpi al tiu unueco.

Mi ja konsentas, ke la specialistoj devas konservi sian liberecon en la elekto de la terminoj, kiujn ili bezonas, ĉar nur ili havas taŭgan kompetentecon por tiu elekto.

Tamen, la unueco, nepre necesega por bona kaj regula evolado de nia lingvo, ne povus esti certigata en la partoj komunaj al la diversaj specialaj vortaroj, se la konkludoj deciditaj de iu el sekcioj de specialistoj malhelpus la laborojn entreprenatajn de la aliaj sekcioj ; kaj plie, necese estas, ke ĉiu sekcio povu, se bezone, esti informata pri la laboroj farataj kaj la decidoj alprenitaj en la aliaj sekcioj.

Tio, koncernas ankaŭ la specialistojn, kiuj izolitaj aŭ tro malmultaj por organizi sekciojn de specialistoj, laboras pri teknikaj aŭ sciencaj vortaroj, kaj kies konoj povas ofte tre utili al la ĝenerala laboro.

En celo de unueco, kaj por ke interesaj laboroj ne estu farataj sen utiligo, la sekcioj de specialistoj, kiel la izolitaj specialistoj, havas profiton faciligi al mi la povon interrilatigi ilin pri la komuna parto de iliaj vortaraj laboroj, kaj tiel helpi al tiu necesega unueco.

Mi do petas tiujn sekciojn kaj izolitajn specialistojn, ke ili bonvolu regule informi min pri la stato de siaj vortaraj laboroj, kaj pri la decidoj alprenitaj de la sekcioj rilate al tiuj laboroj.

Aliparte, mi volonte metas min je ilia deziro por ĉiuj sciigoj, kiuj estus utilaj al ili.

Ch. VERAX,

*Direktoro de la Akademia Sekcio  
por la Scienca kaj Teknika Vortaro.  
35, boulevard Arago, Paris (XIII<sup>e</sup>).*

*Proponoj pri Terminologiaj Fundamentaj Principoj  
por la scienca lingvo en Esperanto.*

La gravaj decidoj, kiuj koncernas la sciencajn nomenklatureojn de la naciaj lingvoj, estas komisiitaj al la Internaciaj Kongresoj, kiuj okazas en taŭgaj epokoj, precipe dum la Universalaj Internaciaj Ekspozicioj, ĉar tiam pli facile estas kunvenigi kongresanojn el diversaj landoj.

La Internaciaj Kongresoj ekzamenas kaj diskutas la laborojn fari-tajn de Konstantaj Komisionoj, kiuj antaŭe preparis la traktotajn demandojn. La Kongreso, post diskutado, formulas siajn decidojn pri la temoj, kiujn ĝi opinias sufiĉe esploritaj.

Tiujn decidojn ĝi esprimas ĝenerale en formo de *deziroj*. Tamen, kvankam ili estas prezentitaj en tiu formo, la scienculoj, en celo de unueco, respektas tiujn decidojn kaj akceptas ilin kiel leĝojn.

La decidoj, kiuj rilatas al la sciencaj nomenklatureoj, estas formul-itaj en formo de *Reguloj kaj Rekomendoj*; ili esta fundamentitaj sur ĝeneralaj principoj, kiuj estas kvazaŭ regularo por la starigo de tiuj Reguloj kaj Rekomendoj.

En la diversaj dokumentoj de la lastaj Internaciaj Kongresoj de Zoologio kaj Botaniko, mi ĉerpis la artikolojn de tiuj Fundamentaj Principoj, kiujn mi opiniis utilaj por la starigo de simila regularo, kiu, en scienca kaj teknika fakoj de la lingvo Esperanto, povus utili

al la specialistoj, por starigi regulojn, kiujn ili povus alpreni por la esperantaj nomenklaturetoj. Kelkajn el tiuj artikoloj mi simple tradukis ; aliajn mi iom modifis por konformigi ilin al la ecoj de la esperanta lingvo.

La rezulton de tiu laboro mi prezentas ĉi sube kaj proponas al la esperantistaj sciencistoj kaj teknikistoj por la starigo de iliaj esperantaj nomenklaturetoj.

Mi opinias, ke, ĉar tiuj fundamentaj principoj, jam elprovitaj en la Sciencaj Internaciaj Kongresoj ne esperantistaj, liveris bonajn rezultatojn, ili liveros same bonajn en la esperantistaj Sekcioj de specialistoj.

Mi sekvigas tiujn Fundamentajn Principojn per *Konsiloj al la Verkantoj*, kies artikoloj devenas ankaŭ de la dokumentoj de la Internaciaj Kongresoj de Botaniko kaj Zoologio ; mi klopodis por konformigi ilin al la bezonoj de la scienca kaj teknika esperanta verkaro.

Ch. VERAX,

## **Terminologiaj Fundamentaj Principoj por la Scienca lingvo en Esperanto.**

### *Reguloj kaj Principoj.*

ART. 1. – La unueco en la Scienca lingvo ne povas esti certigata en sia disvastiĝo kaj evoluado en ĉiuj landoj, sed aro da Reguloj volonte akceptitaj kaj alprenitaj de la plej multo de la ĉiunaciaj sciencistoj kaj teknikistoj.

ART. 2. – La celo de la Reguloj estas alporti ordon kaj regulecon en la diversaj esprimoj de la Scienca Lingvo, kiujn liveris al ni la estintaĵoj, kaj ankaŭ prepari la esprimojn, kiujn oni bezonos.

ART. 3. – La reguloj estas retroaktivaj ; tio signifas, ke la vortoj, formoj aŭ esprimoj kontraŭstarantaj iu Regulon, estas forlasotaj.

ART. 4. – Krom la Reguloj, estas ankaŭ *Rekomendoj*. La Rekomendoj rilatas al malpli gravaj temoj ; ili ankaŭ celas certigi en la estonteco la unuformecon de la Scienca Lingvo, sed la vortoj aŭ esprimoj kontraŭaj al iu rekomendo, kvankam ne imitindaj, ne estas nepre forĵetotaj.

ART. 5. – La Reguloj devas esti fundamentitaj sur sufiĉe klaraj

kaj fortaj motivoj, por ke ĉiu sciencisto aŭ teknikisto bone komprenu kaj volonte akceptu ilin.

ART. 6. – En ĉiuj fakoj de la Scienca Lingvo, la fundamentaj principoj estas :

- 1° Celi la fiksecon de la vortoj kaj de la esprimoj ;
- 2° Eviti aŭ forĵeti la uzadon de formoj aŭ esprimoj, kiuj povas naski erarojn, malklarecon, aŭ konfuzojn en la lingvo.

Post tio, plej grave estas eviti ĉiun ne necesan kreadon pri vortoj. La aliaj konsideroj, kiel la bonsoneco de la vorto, la pli-malpli disvastigita uzado, la respekto al iuj personoj, estas flankaj, kvankam konsiderindaj.

ART. 7. – Neniu uzado kontraŭa al la Reguloj devas esti konservata, se ĝi povas naski konfuzojn aŭ erarojn. Kiam iu uzado ne havas tiajn malutilojn, ĝi povas necesigi iujn esceptojn ; sed, ĉar tiuj ĉi estas *esceptoj*, oni zorgos por plej eble ne disvastigi, nek imiti ilin.

ART. 8. – Fine, kiam Regulo ne ekzistas, aŭ kiam la konsekvencoj de iu regulo estas necertaj, starigita uzado faras leĝon.

#### *Pri la sendependeco de la Scienca Lingvo.*

ART. 9. – La principoj, reguloj kaj esprimoj de la scienca Lingvo devas esti laŭeble plej similaj al tiuj de la vulgara Lingvo. Tamen, la scienca Lingvo estas nepre sendependa de la vulgara lingvo.

ART. 10. – Sekve de tiu sendependeco, afiksoj de la diversaj nomenklaturetoj de la scienca Lingvo estas tute apartaj de tiuj apartenantaj al la vulgara Lingvo ; tamen, la afiksoj de tiu ĉi, kiuj taŭgas ankaŭ por la Scienca Lingvo, estas komune uzotaj de ambaŭ lingvoj, konforme je la artikolo 9<sup>a</sup>.

ART. 11. – La diversaj Fakoj de la scienca Lingvo estas sendependaj unu de la aliaj, kiel estas ankaŭ inter si la diversaj nomenklaturetoj : sekve, iu afikso, jam apartenanta al iu nomenklatureto, povas ekzisti ankaŭ en alia nomenklatureto kun simila aŭ eĉ tute malsimila signifo, kondiĉe, ke tio ne kaŭzas konfuzojn aŭ malklarecon (Ekz. *it*, *oz*, *at*, k. a.).

ART. 12. – Same, sekve de tiu sendependeco, iuj specialaj vortoj, jam apartenantaj al iu fako de la Scienco, povas ekzisti ankaŭ kun

simila aŭ eĉ tute malsimila signifo en alia fako, kondiĉe ke ili ne kaŭzas konfuzojn (Ekz. *lifto*, *aberacio*, k. a.).

## Pri sciencaj kaj teknikaj verkoj

### *Konsiloj al la verkantoj.*

ART. I. – Neniu verkanto devas ŝanĝi alprenitan vorton aŭ esprimon sen gravaj motivoj, fundamentitaj sur pli plena kaj pli pripensita kono de la temo aŭ de la faktoj, aŭ pro la neceso forlasi formon kontraŭan al la Reguloj (vidu : *Fundamentaj Principoj*, art. 7).

ART. II. – La verkantoj, kiuj bezonos krei aŭ formi novajn vortojn aŭ esprimojn, devas zorgi pri la jenaj konsiloj :

a. Ne krei novan vorton sen nepre bezono. Sekve, antaŭ ol krei novan vorton, oni devas certigi sin, ke iu jam uzata vorto aŭ esprimo ne ekzistas aŭ ne taŭgas. La ofta legado de bonaj verkoj kaj la konsulto de bonaj vortaroj informos pri tio.

b. Se necese estas krei novan vorton aŭ esprimon, oni devas sin gvidi laŭ la plej granda internacieco. Oni speciale atentos la eblan superrangon de iu nacia lingvo en la fako, al kiu apartenas la tradukota esprimo, kaj, se la internacieco ne sufiĉas por la elekto de la nova vorto, tiu superrango anstataŭas la nesufiĉan internaciecon. Kiam tiuj klopodoj liveras vorton, kies akcepto ŝajnas necerta, ĉiam preferinde estos skribi la vorton kun ĝia nacia ortografio, inter krampetoj, kaj per klinitaj literoj.

c. Ne formi vortojn aŭ esprimojn malfacile paroleblajn.

d. Eviti tro da simileco inter vortoj, precipe kiam tiuj vortoj havas apudajn aŭ analogiajn signifojn.

e. Eviti la alprenon de vorto, kiu similas alian jam ekzistantan vorton, kun kies signifo ĝi povus naski konfuzojn (vidu : *Fundamentaj Principoj*, art 6, 2<sup>o</sup>)

f. Eviti la vortojn, kiuj formas pleonasmojn, kaj nome la uzadon de afiksoj, kiuj ne donus pli da precizeco klaj klareco al la bona kaj facila komprenebleco de l'esprimo. La plej simplaj formoj estas ĉiam plej facile kompreneblaj ; sekve preferindaj ; do oni devas uzi la afiksojn, nur kiam la bezonata precizeco de la vorto nepre postulas ĝin.

ART. III. – La verkantoj bone faros ankaŭ, se ili akceptas la sekvantajn konsilojn :

a. Eviti la stilajn formojn kaj la kunmetitajn vortojn, kiuj estus malfacile kompreneblajn.

b. Pri la novaj vortoj aŭ esprimoj, doni, kiam tio povas ŝajni utila, difinon de la nove uzata vorto aŭ esprimo, aŭ klarigon pri ĝi, per noto je la malsupro de la paĝo, kaj se eble, aldoni ĝian tradukon en kelkaj naciaj lingvoj.

c. Starigi, post la finiĝo de la verko, liston, alfabete ordigitan, de la nove uzitaj vortoj, kun ilia traduko en unu aŭ prefere en kelkaj lingvoj, aŭ kun numeroj montrantaj la paĝojn de la libro, kie oni legos la difinon aŭ eĉ nur la klarigojn necesajn por ilia facila kaj ĝusta komprenebleco.

ART. IV. – Neniam alpreni novan radikon, ne forminte per ĝi *ĉiujn uzeblajn derivatojn*, kaj fiksinte la precizajn signifojn de tiuj derivatoj laŭ la signifo de la elektita naskvorto.

ART. V. – Ĉiu vorto aŭ esprimo estas maluzinda :

1° Kiam ĝi devenas el presa eraro ;

2° Kiam ĝi rezultas el konata eraro pri la signifo, kiun oni donis al ĝi origine ;

3° Kiam ĝi ne estas konforma al la artikolo IV.

ART. VI. – Ĉiu verkanto, kiu deziras helpi al la unuformeco de la lingvo, devas klopodi por ne uzadi vorton, kiu estas en unu el la sekvantaj kazoj :

a. Kiam oni ne povas formi per ĝi ĉiujn necesajn derivatojn laŭ la signifo donita al la naskvorto (*vidu art. IV*)

b. Kiam ĝi estas *nenecesa* duoblaĵo de la alia vorto konsentita pli preciza kaj pli regula. Se ambaŭ vortoj aŭ esprimoj estas same taŭgaj, la plej kutime uzata estas preferinda, kvankam ambaŭ povas esti akceptitaj.

c. Kiam ĝi povas naski konfuzojn aŭ erarojn (*vidu art. IV, 2°*)

d. Kiam ĝi kontraŭstaras la gramatikon aŭ la Regulojn de la nomenklaturaj.

ART. VII. – Iu vorto aŭ esprimo, kies boneco estas necerta, povas tamen esti konservata, ĝis kiam alia pli bona vorto aŭ esprimo estos konata por anstataŭi ĝin.